mium, while the long continued applause and evident enthusiasm which greeted the several numbers of the program impressed even the heretofore unsympathetic newspapers of Krakow. All who heard it declared it to be a literary and music event of unusual merit.

Earlier in the evening occurred two lectures in Esperanto, one by Dr. Fišer of Tiflis, on "A Half-forgotten Corner of Caucasus," the other by Dr. Geliebter of Vienna, on "Illusion and Reality"

TUESDAY

A largely attended meeting of students occurred in the morning under the auspices of the *Universala Studenta Asocio*.

In the early afternoon about 1200 persons took the train to Wieliczka, a town half-hour distant southeast of Krakow, where is perhaps the most famous salt mine in the world. On arriving at the station, which was gaily decorated for the occasion, the party was met by the officials of the town, and the Mayor, Mr. Aywas, delivered *in Esperanto* an excellent speech of welcome, to which a response was made by Dr. Mikolajski, President of the Congress. Access to the mine is had by shafts and wooden stairways, and on account of the size of the party both means of entrance were used. The interior was dimly but sufficiently illuminated by candles placed here and there along the galleries and chambers. The full depth to which the party descended was about 1000 feet, but before reaching the lower corridors we visited the Chapel of St. Antoni, the Chapel of St. Kinga, and the subterranean lake *Goluchowski*. Here at this latter place, as at several other points along the way, brass bands played. Above the lake, weirdly illuminated by torches of red fire, sounded the strains of the Polish National Hymn, at the conclusion of which everyone enthusiastically cheered, "Vivu Polujo, vivu Poloj!" The chapels, with altar, statues, etc., entirely carved out of the native salt, were of especial interest. It was doubtless a surprise to most of the visitors to find a buffet with full supply of food and drink, and a ballroom, in the depths of the mine! After making use of these diversions the

party, using the lift, reached the outer air without accident.

In the evening occurred a theatrical entertainment in the building of the Architectural Exposition. If the "Jubilee Evening" demonstrated the adaptability of Esperanto to music and poetry, singing and declamation, the event of the following evening no less showed how people of at least twenty nations can laugh at the same jokes. Many of the numbers upon the program, particularly "Urso"—a bright little comedieta translated from the Russian by Mr. Devjatnin and acted by him, by Miss Schaefer from Germany, and Mr. Romanoff from Turkey, were of a high order and well acted.

WEDNESDAY

A number of sectional meetings were held this morning, mostly in the building of the Commercial Academy. In the early afternoon the "International Scientific Association" held a meeting. The reports of the officers showed the Association to be in good working order, particularly in the direction of establishing an international technical vocabulary and in regard to the "Scienca Gazeto," the organ of the Association. It was unanimously resolved to thank Mr. McKelvey of the Bureau of Standards, Washington, D. C., for his efforts in introducing Esperanto in scientific congresses. (Mr. McKelvey is a member of the Propaganda Committee of the ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, with this branch of propaganda as his special line of work.)

The third session of the Congress was important chiefly on account of its being the first time the voting blanks distributed among "rajtigataj delegitoj" (according to the number of fully organized and paid up societies they represented) were made use of. The Budget of the Central Office fixing the tax of 50 cents for each group of twenty-five organized Esperantists sending a delegate, was fully approved.

In the early evening many attended a lecture given by Mr. Ebenezer Howard of Letchworth, England, the founder of the "Garden City" there, and author and propagandist of the Garden City Move-

ment, which formed the subject of his lecture. Mr. Howard, like many others, began the study of Esperanto mainly on account of the use he could make of it in the movement which he has at heart.

The theatrical presentation which forms a necessary part of every Esperanto Congress was represented in the "Mazepa," a tragedy by the well-known Polish dramatist, Kuljusz Slowacki, translated by Dr. Grabowski, and acted by seven of the most eminent actors of the Krakow stage. Not only was it apparent that their work was that of finished artists but their use of the International Language was perfect. They proved that Esperanto is fully capable of expressing the most powerful emotions of men and women. The play may have left a bad taste in the mouth of the audience, but it is not the fault of Esperanto that all the prominent characters die in the last act!

THURSDAY

This was a religious holiday. Services were held in Esperanto in the Roman Catholic Church of St. Mary, the Protestant church, and one of the Hebrew synagogues. Those who attended were well repaid, for in every case the sermons, entirely in Esperanto, were well rendered.

The Socialists also had a big meeting, about 600 attending at the Circus in the Park. Speeches were made by a dozen speakers from various countries, whose remarks were translated into Polish, sentence by sentence, by one of the local esperantists. The audience was enthusiastic in its approval of every reference to Esperanto as a means of communication between those of the various nations who are working toward better economic conditions. At the conclusion, a resolution was unanimously adopted favoring the use of Esperanto as a *fourth* language at future congresses of Socialists.

The scientists and students had their inning when the Manifestation for Copernicus occurred in the court of the Jagiellona Library. The visitors at Krakow were not allowed to forget that this famous scientist was a native of Poland. The statue of Copernicus was decorated

by the students, and a number of speeches were made pointing out the many contributions which Poland has made to science.

The distribution of prizes in the Literary Competition took place in the Architectural Exposition. This event was followed by a concert and the photographing of various groups according to nations.

The International Ball, the great social event of the Congress, was preceded by a supper which was punctuated by the occasional song, declamation and joke. As usual, there was a great deal of fancy costuming, but at an Esperanto Ball one may wear the gaudy colors of one's native land with more than ordinary justification. Those costumes which attracted the greatest attention, perhaps, were old-time Polish dresses, the costumes of the Ukrainians, and those of Hungary, Spain, India and Germany. There were many costumes which while having no national significance were indicative of some profession, such as the cap and gown of the university professor, and the military uniforms representing past and present periods. The genial general secretary of the local committee, Dr. Rosenstock, whose face bears some resemblance to the first Napoleon, created great amusement by arraying himself in the uniform of that character. Like other affairs of this kind the International Ball held the crowd until a late hour.

FRIDAY

The day began with a demonstration in honor of Adam Mickiewicz, the popular Polish poet. His monument stands in the "Rynek," or chief place in the center of the city. Around this gathered several hundreds of the Esperantists, while Mr. Hodler of Geneva, and Dr. Mikolajski made the addresses, the latter also speaking in Polish for the benefit of the non-esperantist audience on the edge of the crowd.

The rest of the morning was occupied by many sectional meetings and the third session of the U. E. A. The visitor to these gatherings, whether he understood Esperanto or not, must have been im-

pressed with the earnestness with which the proceedings were conducted. Here were groups of men and women meeting and talking not *for* Esperanto especially, but *in* Esperanto concerning many interests and ideas, for which the International Language is only the means. Some of these groups have for several years existed as regularly organized Associations, as for instance the "Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio" (Teko), the "Internacia Ligo de Poŝtovicistoj" (Ildepo), for physicians and post office officials respectively. Other associations similarly organized on an international basis meeting yearly and using Esperanto exclusively in their deliberations are those for theosophists, vegetarians, teachers, Roman Catholics, jurists and railroad men. Several of these permanent Associations issue regular gazettes devoted to their specialty, and of course printed entirely in Esperanto.

In the regular session of the Congress which occurred in the afternoon it was decided to hold the next Congress at Genoa, Italy, Dr. Stromboli of that city presenting the formal invitation on behalf of the Italian Esperantists. Much interest was caused by a competing invitation from the city of Breslau, Germany, the delegate presenting it stating that the invitation comes from the *city authorities*,—the first time in the history of the movement that this has been done. While the vote was almost unanimously in favor of accepting Italy's invitation, the Congress with one voice and amid great enthusiasm resolved to thank the city of Breslau for its cordial offer.

In the evening many gathered at the New Theatre to hear an opera in Esperanto, perhaps the first that has ever been sung in the language. The voices were good and music of a high order, and everyone who went was pleased with "Halka."

SATURDAY

A number of Associations held their closing sessions in the morning.

In the early afternoon occurred a regular feature of the program, the Kosciuszko manifestation, which will be of especial interest to Americans. On the

north side of the "Rynek" there is a stone sunk in the pavement, and the lettering on it states the fact that upon this spot, on the 24th of March, 1794, Tadeusz Kosciuszko swore that he would defend the liberties of his country. The Americans attending the Congress arranged a tribute to this soldier-hero, whose services in behalf of American independence are gratefully remembered. An American flag and ribbon decorations had been brought from the United States, and these, with an appropriate floral piece, were laid upon the stone, to be conserved later in the National Museum in Krakow. Speeches were made by Mr. Hetzel, on behalf of the ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, and also by Mr. Parrish, Mr. Mikolajski, President of the Congress fulfilling the role of translator into Polish of the remarks of the other speakers.

The closing session of the Congress will always be remembered by those attending it as a most impressive and inspiring event. The ovation to Dr. Zamenhof, the author of Esperanto, and that to the Local Committee, whose labors resulted to what was declared the best arranged, most harmonious, and most momentous congress yet held in Europe, were exceptionally enthusiastic.

POST-CONGRESS EVENTS

Although this ended the Congress officially, a number of events which took place afterwards should be mentioned.

On Saturday evening occurred a lecture by Mr. Devjatnin, of Russia, in the Old Theatre. To attend the Congress he and Mr. Romanoff, who is Turkish, walked on a "propaganda tour" all the way from Paris, and this furnished the speaker with his theme.

The same speaker also gave an interesting description of the "Parkurbo," a novel propaganda scheme which a number of prominent German Esperantists are fostering. In the neighborhood of Munich, Bavaria, a tract of land has been bought, upon which the projectors expect to erect a model town to be called "Esperanto," and one of the conditions of a residence there is a knowledge of the language or an earnest intention to learn

it. The plans and architectural drawings of this model town are alluring, and Mr. Schlaf, of Munich, and Dr. Kandt, of Bromberg, with their associates, assure us that the project is entirely serious and that its existence is more than merely on paper, having, as they claim, already a capital of 2,000,000 marks.

One of the local theatres arranged to have a part of its program of Saturday evening in Esperanto, and many congress members attended. Not only were the chorus singing of "La Espero" and the several solos enjoyed, but with a native Pole at one's elbow, as several of

us had, even those parts of the program which were entirely in Polish were to some extent understood.

Sunday, the 18th, was leave-taking day. As it was the birthday of the Emperor, a few remained to witness the military evolutions on the parade ground outside the city, but by far the greater number took train either for Zakopane, a summer resort in the Tatra mountains, or to Budapest, where the Hungarian esperantists had arranged a three days' "post-congress," with an extensive program of meetings and excursions in the neighborhood.

La Oka Kongreso de Esperanto

DE D. E. PARRISH

EŬROPA REPRESENTANTO DE LA LOS ANGELES' KOMERCA ĈAMBRO.

JAM kelkajn tagojn antaŭ la 11a de Aŭgusto, la urboj sur la ĉefaj fervojoj proksimaj de Krakovo komencis zumi per la alvenado en ilin de kunvenantaj gesamideanoj. Belaj festoj estas aranĝitaj de multaj urboj en Germanujo, Polujo kaj Aŭstrio por akcepti la transpasantajn gastojn el ĉiuj landoj; kaj fine, ĉu vespere la 10an, aŭ matene la 11an de Aŭgusto, ĉio kolektiĝas en la antikva pola ĉefurbo, Krakovo, la urbo de la Oka Universala Kongreso de Esperantistoj.

Malfacila estas la tasko de la raportanto, pro absoluta neebleco ĉesti ĉiujn kunsidojn kiuj dum 7 gloraj tagoj okazadis, sed mi laŭeble plenumos tiun devon. Tial pardonu al mi, se mi ne traktas iun demandon, de tro speciala intereso, ĉar nur ĝeneralan raporton mi povas ĉi tie prezenti.

Tuj je la alveno en la stacidomo mi konstatis ke tiu ĉi kongreso estas escepte bone aranĝita! Ĉe la vagonaro mem, kun alte levitaj standardoj de nia Espero, estis la afablaj akceptantoj. Oficejo de la Akceptanta Komitato estas en la stacidomo kaj tie, antaŭ ol foriri, oni povas ricevi la necesajn informojn pri loĝejo, aŭ eĉ gvidiston por tien konduku.

Elirinte el la stacidomo, la alvenanto troviĝis antaŭ vere surprizanta afero. Jen, vidu, ĉu ja la tuta urbo esperantisti-

ĝis? Ĉar antaŭ la okuloj elstaras, ĝuste trans la strato, longaj vicoj da reklamaj afiŝoj, kies preskaŭ ĉiu afiŝo estis Esperante presita, aŭ almenaŭ havis tekston nacian kaj Esperantan! Kaj la tuta urbo same; dum la kongresa semajno ne malpli ol 30 diversaj afiŝegoj anoncadis la ĉefojn komercejojn de Krakovo!

Sabaton vespere okazis varietea prezentado en la Teatro de Novajoj, gajaj kantoj, deklamajoj humoraj, k.t.p. k.t.p., tute internaciaj.

DIMANĈO.

Dimanĉe, la 11an, okazas la Malferma Kunsido de la Kongreso, je la 3a posttagmeze en la belaj ĉambroj de la "Malnova Teatro." Sendetale la tagordo estis jena: Elekto de la Estraro de la Kongreso (Oni elektis kiel prezidanton, S-ron. Stefan Mikolajski) kaj nomado de ĝiaj komitatanoj. Poste parolis la urbestro de Krakovo pole, kaj legis bonvenan saluton en Esperanto, je granda aplaŭdo. Kaj nun longa vico de aliaj salutoj al la Kongreso, de la Komerca Ĉambro de Krakovo, de la Prezidanto de la Loka Organiza Komitato, kaj de la multaj oficialaj delegitoj al la Kongreso. Tiam paroladis D-ro Zamenhof.

Oni tralegas la ricevitaĵajn telegramojn kaj poste parolis la delegitoj de la diversaj esperantaj kaj neesperantaj organi-

zoj, kiuj sendis specialajn reprezentantojn al la "Oka." Notinde estas ke multaj urboj, ĉambroj komercaj kaj ministerioj de edukado sendis memvole reprezentantojn.

La landoj reprezentataj en la Kongreso, ĉu oficiale aŭ ne, estis jenaj: Aŭstrio, (Moravio, Kroatia, Bohemio, Galicio), Hungarujo, Serbujo, Bulgarujo, Germanujo, Rusujo, Polujo, Francujo, Tuniso, Nederlando, Svisujo, Belgujo, Danujo, Norvegujo, Meksiko, Usono, Rumanujo, Turkujo, Italujo, Hispanujo, Aŭstralio, Anglujo, Kimrujo, Irlando, Skotlando, Finnlando, Svedujo, Japanujo, kaj Hindujo (certe mi forgesis kelkajn!) do, 32 diversaj landoj!

Vespere preskaŭ la tuta jam alveninta kongresanaro kunvenis en la "Pafista Domo" por partopreni ĝis la 1a horo matene komunan vespermanĝon. Orkestro de la 100a Inf. Reg. donis bonegan muzikon, kaj logis al dancado, kiu tuj post la manĝo komenciĝis. Tiu vespero havis la deziratan efikon, t.e. interkonatigi la multnaciajn partoprenantojn tuj en komenco de la semajno.

LUNDO

Frumatene lundon la gekongresanoj kunvenis sur la "Rynek" (ĉefplaco) sub la bela monumento de Mickiewicz por komuna fotografado. Poste oni marŝis al la remparoj de la antikva kastelaro de la polaj regintoj, *Wawel*, kie okazis dua fotografado. Tiam oni rapidis al la Malnova Teatro, kie okazis kunsido de la U. E. A. Dum tiu ĉi kongreso la kunsidoj de la Universala Esperanta Asocio representis "kongreson interne de kongreso." La agadkampo de la U. E. A. tiom rapide disvastiĝis en la daŭro de la 4 jaroj de post ĝia fondo, ke nun ĝiaj kunsidoj (okazantaj samloke kaj samtempe kiel tiuj de la Generala Ĉiujara Kongreso) havas vere tre gravan karakteron.

Samtempe kun la kunsido de U. E. A. okazis multaj fakaj kunsidoj, de Katolikoj, Liberpensuloj, Socialistoj, Teknikistoj, Laboristoj, Journalistoj, Instruistoj, Bankistoj, Juristoj, k.t.p., kaj dum la tuta kongresa semajno tiom multe da diversaj fakaj kunvenetoj okazadis ke neniu povis ilin detale raporti.

Je la 3 1-2 malfermiĝas la unua labora kunsido de la Generala Kongreso (De nun mi citos nur la gravajn diskutojn aŭ decidojn faritajn dum la Kunsidoj). La Prezidanto legis la regularon proponitan por la voĉdonado en nuna kaj en sekvan-taj kongresoj. Akceptita kun malgranda amendo, kaj oni petis la Rajtigitajn Delegitojn konformiĝi al tiuj reguloj en la diskutado kaj voĉdonado.

Dum la lasta Kongreso, en Antverpeno, oni antaŭmetis proponon de kotizajo de malgranda sumo por ĉiu ano de grupoj sendantaj rajtigitan delegiton al la Kongreso. Pro manko de plena kompreno pri tiu kotizajo en la lasta Kongreso, oni nun antaŭmetas la demandon, ĉu akcepti la voĉojn de la Delegitoj de grupoj nepagintaj tiun kotizon, aŭ nur tiujn de jam pagintaj la kotizon grupoj. P-ro Bourlet klarigis kaj oni akceptis por la harmonio de la Jubilea Kongreso, akcepti ankaŭ tiujn kiel plene rajtigitajn Delegitojn. Sekve de tio, kelkaj nepagintaj Delegitoj promesis tamen pagi la kotizon (10 centimoj por ĉiu membro de siaj grupoj). Oni malfermis la listojn ĝis mardo tagmeze, por ebligi ke la delegitoj ne enskribigintaj sin faru tion. Poste P-ro Bourlet klarigis tre koncize la staton de la Centra Oficejo, kaj montrante ke la kotizoj de la nun enregistritaj grupigitaj 30,000 Esperantistoj, po 70 centimoj, sufiĉos subteni la Centran Oficejon, petis ke la Esperantistaro ĝin akceptu kaj funkciigu de post la 1a de Januaro. Post diskuto pri la nuna defcito de la Centra Oficejo, kaj kompreniĝo ke ĝi estos transdonata al la Esperantistaro sensulde, oni akceptis granda-plaŭde la proponon, kaj voĉdonis danki Generalon Sebert pro sia malavara donaco. S-ro Mudie laŭdis ke oni ne kunligis la demandon de Internacia Organizo kun tiu pri la Centra Oficejo. Do, en la sekvanta Kongreso ĉiu Rajtigitaj Delegito devos esti transdoninta la ĉiujaran kotizajon de 4 sd. por ĉiu membro de sia grupo. Per la sumoj tiel kolektitaj oni malkare subtenas la gravan Centran Oficejon, tiel utila por nia afero.

Lundon vespere en la Malnova Teatro la "Jubilea Festvespero" tenis nin ĉiujn ravitaj de la belaj polaj kaj esperantigitaj naciaj kantoj. Partoprenis S-ino Jad-

wiga Szayer (Ada Sari), konata opera kantistino; S-ino Stanislaw Wysocka, dramatisino; kaj S-ro Wiktor Bieganski, dramatisino. Ĉiuj ricevis grandan aplaudon de aŭdantaro internacia. S-ro Belmont pole deklamis amuzon paroladon.

MARDO

Mardon la 13an okazis unu el la unikajoj de la Oka Kongreso, ekskurso al la famaj Salminejoj de Wieliczka. Je tagmezo, plenigante 25 vagonojn je kongresanoj, ni ekveturis al la urbeto Wieliczka. Alveninte tien, jen atendis nin vera surprizo,—la urbestro faris en perfekta Esperanto bonvenan paroladon, kiun oni laŭtege aplaudis! Sekvante la bonan orkestron ni marŝis kelkajn minutojn tra agrablaj vojoj al la minejoj. Ambaŭflanke staris densaj vicoj da homoj scivole rigardantaj nin, kunvenintaj por vidi tiujn strangegulojn, kiuj pli ol milope el 30 landoj povas tamen interparoli!

Surmetinte unupecajn blankajn supervestojn kontraŭ la malpurigo, ni estis po 5—6 personoj rapide mallevitaj en la subterarojn, kaj komenciĝas la esploron de la plej interesaj haloj, galerioj kaj pasejoj. Longe vagis nia aro, laŭ vojoj nin kondukantaj jen supren, jen malsupren, tra vastaj haloj, ĉambraroj el solida stonsalo ĉisitaj, preter delikate, kurioze skulptitaj kapeletoj, kun figuroj de la sanktuloj, el la salo. Subtere estis ankaŭ stacidomo, preskaŭ kiel sur la fervojoj de kiuj ni ĵus venis. Ni bone manĝis tie, kaj daŭrigante nian vojon ni alvenis al la bal-ĉambro, kastega ĉambro de kies plafono pendas grandaj kandelaboroj el la salo; lumigita de mil kandeloj kaj de artaj fajraĵoj. Orkestro ĉi tie ludis valsojn, kaj en la fantoma lumado, 300 metrojn sub la tero, homoj el 30 landoj paroladis unu lingon, kaj kune dancis. Denove trapasante longajn koridorojn kaj ĉambron post ĉambro ni atingis kaj per pontoj pasas nigrajn lagojn; sur unu el ili orkestro en boato ludis, sur aliaj nur la rebulo de la torĉoj de niaj ministaj gvidantoj respeguliĝis en profundoj akvoj! Denove ni grimpis supren, ĉie tra ĉambraroj tiel vastaj ke oni perdis ideon de amplekso, ĉie ludis por ni la orkestro, kaj la muroj reehis la babiladon

de mirigita internaciano! Ja longe nia lingvo sufiĉe disvastiĝis *sur* la tero, sed hodiaŭ por la unua fojo *sub* la tero!

Revenante al la surfaco ni provizis nin je belaj memorajoj,—malgrandaj objektoj, skulptitaj el la salo tiel pura ke ĝi similas vitraĵon. Denove plenigante la longan vagonaron, tirate de 2 lokomotivoj ni malrapide forveturis ree al Krakovo, sed kun gajaj krioj de “Ĝis Revido” kaj dankoj pro la mirindaĵoj de tiu tago!

Ĉiuj estas sufiĉe lacaj, sed la koncerto kaj deklamaĵoj en la Arkitektura Ekspozicio nun vespere allogis. Multnaciaj amatoroj nin amuzis. Estas komedieto ludata de Turko, Ruso kaj Germanino; Skotlandaj ŝercoj en Esperanto, kantoj en Esperanto el Rumana kaj Hungara lingvoj tradukitaj, mimikadoj, k.t.p. en longa amuzplena vico!

MERKREDO.

Post tuta tago da nura amuzado, merkredo la 14a estis tago de laboro. Matene la kunsido de U. E. A. definitive fiksas la kotizaĵon de siaj membroj por la venontajaro je 1 Sm. kaj forigas la kategorion de aprobantaj membroj, pro tio ke multaj tiaj estis ĝis nun varbitaj. Posttagmeze la Generala Kunsido esploris la demandon pri la Komisiono devonta studi la proponon de Internacia Organizaĵo de Esperantaj Asocioj. Fine oni ne definitive prokrastis la fondon de tia Komisiono.

Vespere en la belega Urba Teatro, kies falkurteno estas majstroverko de pola pentristo Henryk Siemiradski, ni plenigis ĉiujn lokojn por aŭskulti la belegan dramon “Mazepa,” de la plej fama pola poeto Slowacki. La Krakovaj geartistoj, lerninte la rolojn parkere, laŭdinde prezentis al ni, en Esperanto-internacia vesto, la bone konatan verkon, en traduko de la geniulo Grabowski. Granda aplaŭdo sekvis la dramon, kaj alvokinte multfoje la lertajn geaktorojn oni faris ankaŭ al la tradukinto ovacion!

JAŬDO.

Jaŭdo la 15a estis kvazaŭ-dimanco, kun diservoj en la Katolika, Protestanta kaj Hebrea preĝejoj. Ĝi estis la tago

de la "Ĉieliro de la Sankta Dipatrino." En la stratoj interesitaj kongresanoj rigardis la procesiojn de sanktaj figuroj portataj sur la ŝultroj de virinoj. Estis multe da kandeloj, oni kantis kaj portis florkronojn.

Posttagmeze en la haloj de la Arkitektura Ekspozicio, oni disdonis la premiojn por la literatura konkurso, kaj vespere, antaŭ la balo, estis granda amuzplena vespermanĝo, aranĝita de nia eminentulo, Mudie, el Londono. Kelkaj reguloj funkciis por ĉi tiu okazo,—neniuj du personoj parolantaj saman lingvon nacian povas sidi kune, tiel la longaj tabloj, tute ĉirkaŭantaj la vastan salonegon estis okupataj de nacioj perfekte miksitaj! Kaj kiaj gajaj paroladetoj okazis! Kaj kantoj de diversnaciaj samideanoj nin ĉiujn gajigis! Estis bona komenco por la balo, kaj je la 9:30 ni transiris en la grandan balĉambbron. Jen multego da naciaj kostumoj, ŝajnas ke la bela kutimo plivastiĝas. Plej multo estis la belaj vestaĵoj de Polujo, Aŭstrio, Hungarujo, Bulgarujo, Rumanujo, k. t. p., pli malofte viditaj en la ĝisnunaj kongresoj. Rimarkinda estis la vera simileco al Napoleono, de nia ĉeforganizinto Dro. Leono Rosenstock. En vestaĵo de la franca generalo li aperis kiel renaskiĝo de Napoleono mem! Ĝis malfrua horo oni sin amuzis,—jen hungaro dancas kun bela anglino; germano valsas kun italino en nacian kostumo; Japano parolas en angulo malluma, kun enziata polino; brako en brako promenas rusa liberpensulo kun franca katolikino, hebreno kun protestanta norvego; kaj en la fino, ĉirkaŭ la standardo de nia Espero, ĉiuj nacioj, mano en mano, galopis al la ritmo de rapida muziko! Supre, en la altaj balkonoj, sidis la invititaj eminentuloj de Krakovo, de tuta Polujo, kaj rigardis nin, la "internaciajn geknabojn" en festo de nelimigita, nelimigebla amuzo. Kaj kiam ili ne plu miregas pro tio ke ni ĉiuj babiladis interkomprene, tuj ili ekenviis nin! Kaj jen la esperantisto kiu ĉeestis Kongreson estis enviinda,—ĉar kie alie li povus valsi en unu nokto kun ĉarmaj samideaninoj el almenaŭ 20 landoj? La balon oni devas nomi ja grandioza!

VENDREDO.

Vendredo la 16a estis denove labortago en la plano de la Kongreso. Matene la kunsido de la U. E. A. traktis la temojn de Hotel—servado, la enkondukon de Esperanto en la komercan uzadon, kaj la eblecon de kunlaboro de la naciaj societoj kun U. E. A. Ĉeestantaj delegitoj de la naciaj Esperantaj propagandaj societoj favore aŭdis kaj akceptis proponon de konsento inter la U. E. A. kaj la land-asocioj per kio la laboro de la ambaŭ estis multe faciligita.

Posttagmeze okazis diversaj fakaj kunsidoj, kies raportojn oni devus aparte ricevi, pro neebleco ĉiujn ĉeesti. La laborkunsido de la Kongreso aŭdis invitojn por la venonta Kongreso. Estis prezentata de la Urbo de Breslaŭ, Germanujo, oficiala invito por la 9a Kongreso, kaj alia de la Esperantistaro de Genova, Italujo. Voĉdone oni akceptis la inviton de Genova, tiel fiksante tiun urbon kiel la urbon de la 9a Internacia Kongreso de Esperantistoj. Dato ne-definitive proponita estis la semajno sekvanta la unuan dimanĉon en Sept. 1913. Rimarkindaj dum la kunsido de la ĝenerala kongreso, estis la tre trafaj paroloj de Sro. Levy, blinda instruisto, de la fama *Vatra Lumenosa* en Bukaresto. Sro. Levy estis komisiita de Sia Moŝto, la Reĝino de Rumanujo (la fama Carmen Sylva), transdoni al Dro. Zamenhof ŝian portreton kun autografo kiel dank-esprimon. Sro. Levy estas tute blinda, sed veturis al la Kongreso kaj vigle partoprenis en ĝiaj diskutoj. Li parolas Esperanton perfekte.

Vespere, por la unua fojo, grandopero en Esperanto! Trupo de preskaŭ 50 geaktoroj kaj kantistoj prezentis la melodiojn de nia lingvo en Opero "Halka." Vere tiu flanko de la nuna Kongreso estis bonege preparita, kiel ĉio, cetere, kaj ni havis la okazon konatigi kun la verkoj de pola literaturo kaj pola muziko tre simple, ĉar en Esperanta traduko la originaloj povas esti plej perfekte reprezentatoj. Post la opero oni vokis S-ron Grabowski sur la scenejon kie li laŭdis la lertegajn geartistojn per kelkaj frazoj.

SABATO.

Sabato okazis la finaj kunsidoj. Oni esprimis la dankojn, kiujn ni ĉiuj ŝuldis al la Loka Organiza Komitato, al la Urbestro de Krakovo, al la multaj oficialaj delegitoj, k. t. p.

Elokventaj paroloj de D-ro Zamenhof, Rosenstock, Gluck, kaj Mikolajski fermis la lastan Kunsidon,—kaj la Kongreso oficiala ne plu estis!

Vespere la gekongresanoj kunvenis en diversaj kafejoj, por diri “adiaŭ” kaj “Ĝis la revido en Genovo”. Okazis en la Teatro de Novajoj lasta prezentado por esperantistoj, programo el kantoj, deklamoj, komedietoj, k. t. p. ĉio internacie ludita! La kafejoj de Krakovo estis iom unikaj, speciale kafejo Ĉukiernia Lwowska de Jan Michalik, fama en tuta Polujo. Tie ĉi kunvenis multaj por trinki teon aŭ kafon, kaj manĝi la bonegajn multspecajn kukojn pro kiuj Polujo estis konata!

DIMANĈO.

Preskaŭ duono de la kongresanoj estis jam foririntaj, la aliaj estis vekigitaj frumatene de kanonpafado, kiu honoris la Imperiestron Franz Jozef pro la datreveno de lia naskiĝtago. Multaj kongresanoj foriris frue al Zakopane por viziti la belajn montarojn Tatroj je 4 horoj de Krakovo. Ili restis tie, por rondeskursoj en la pentrindajn valojn kaj montojn de tiu pitoreska regiono. Aliaj forveturis al Praha, aŭ al Vieno aŭ Buda Pesto, en kiu lasta urbo estis aranĝita la postkongreso de la Katolikoj. Ankoraŭ multaj iris rekte hejmen al siaj respektivaj urboj kaj landoj.

Kaj nun ĉar ĉio estas kvieta en la urbo de la Oka Kongreso, mi volas reiri la vojon kaj vidi ĉu mi ne povas aldoni kelkajn sciigojn aŭ ĉu mi ion tute forgesis!

Ni devas noti ke la Akceptejo kaj Oficejoj de la Kongreso *perfekte* funkcias. Nur laŭdojn ricevas la multe laborinta Komitato. En la Akceptejo (Domo de la Komerca Akademio) sur la unua etaĝo, estis la speciala oficejo de la Landa Banko, kie oni rapide ŝanĝis monon, aŭ monerigis ĉekojn de la Ĉekbanko. Tie

ĉi la oficistoj de la banko devis konstati la diversnaciecon de la gekongresanoj, ĉar ili ŝanĝis la monon de ne pli ol 30 landoj en aŭstriaĵn kronojn! Sur la sama etaĝo troviĝis bonege aranĝita kaj malkara bufedo, kaj la diversaj bultenejoj por la oficialaj kaj neoficialaj komunistoj de la Kongreso kaj kongresanoj. En la dua etaĝo estis la akceptoĉambro mem (kie oni interŝanĝis provizorajn kartojn kontraŭ la multaj dokumentoj de la Kongreso, kaj ricevis la necesajn biletojn por la teatraĵoj, k. t. p.), la skriboĉambro, vendejoj de Esperantaj libroj, kaj esperantaĵoj, kaj la kunvenejoj de la diversaj fakoj. Sur la tria etaĝo troviĝis plej bone aranĝita ekspozicio kiun ni ĝis nun vidis. Kaj la moto ŝajnis esti “Ĉio en Ordo”.

Dum la Kongreso diversaj demonstracioj okazis, inter ili la manifestacio de la usonaj gekongresanoj, ĉe la ŝtono kie Kosciuszko en 1794 juris batali pro la libereco de Polujo, ĉar Kosciuszko estis unu el la herooj, kiuj venis al la helpo de Usono dum ĝiaj revoluciaj jaroj. Granda florkrono estis preparita kaj ornamita je la rubandoj kiujn Sro. Hetzel, reprezentanto de la ESPERANTISTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO, estis portinta de Ameriko por tio. Je la 2a horo sabate, laŭ bulteno en la informejo, ĉirkaŭe 300-400 personoj kunvenis ĉe la ŝtono, kiu kuŝas ĉe unu flanko de la ĉefplaco, Rynek, en mezo de la urbo.

Supren tenante belan usonan standardon (ankaŭ kunportitan de Usono) Sro. Hetzel per kelkaj esprimplenaj vortoj klarigis kial oni sendis honorigon al tiu loko. La vortojn de Sro. Hetzel oni tradukis polen, kaj ili estis aŭdataj kun intereso kaj longe aplaŭdatoj.

Oni nin ĉiujn fotografis; kaj, kuŝiginte la belan florkronon sur la ŝtonon Sro. Parrish aldonis kelkajn vortojn al la rimarkoj de Sro. Hetzel. Oni tradukis polen, tiam Sro. Parker, Islandano, parolis, kiujn vortojn oni ankaŭ polen tradukis kaj kiuj ricevis grandan aplaŭdon. Ĝis tiam estis kolektiĝintaj proksimume mil personoj, esperantistoj kaj neesperantistoj. Dum ni metis la usonan standardon sur la kronon, eksonis de la alta turo de la preĝejo Sankta Mario la trumpeta muziko de malnova pola kanto,

kiel danko pro tio, ke ni honoris ilian bravulon!

Ĝis vespero la floroj kaj la standardo kuŝis sur la loko kien ilin metis la usonanoj; multaj personoj staris ĉirkaŭ ĝi ĝis nokto. Kaj nun la usona standardo kaj florkrono kun rubandoj de ruĝa, blanka kaj blua koloroj, kuŝas en la muzeo de Krakovo. Sur la rubandoj estas bela teksto en Esperanto je la memoro de bravulo Kosciuszko.

Ĵaŭde la 15a estis manifestacio de studentoj en la korto de la Jagelliona Biblioteko, ĉe la monumento de Kopernik. Okazis dum la kongreso lumbildaj paroladoj de Sro. Fiŝer el Tiflis, pri "Duonforĝesita Angulo en Kaŭkazo"; de Sro. Howard pri "Ĝardenurboj"; de Sro. Parish pri "Kalifornio".

Speciala Kongresa Poŝta Oficejo troviĝis je nur kelkaj paŝoj de la Akceptejo. Laŭ kalkuloj oni sendis kaj ricevis tra tiu oficejo pli ol 30,000 pecoj da kongresa poŝtajo dum la semajno.

Ĉiuj muzeoj en la urbo, same la tramoj, estis tute senpagaj por la Kongresanoj.

Ĉe kunveno de la komercist-kongresanoj en la halo de la Krakova Komerca Cambro vendrede, oni decidis komisi al Sro. Emiljan Loth, el Varsovio, fari raporton pri Esperanto antaŭ la Internacia Kongreso de Komercaj Cambroj kiu okazis en Bostono.

(Redakcia Noto: Raporto pri ĉi tiu kongreso en kiu partoprenis Sro. Loth kaj Sro. Edwin C. Reed, kiu reprezentis la Washington' Komercan Cambron, aperos en la venonta numero de AMERIKA ESPERANTISTO.)

Ĉiuvespere dum la Kongreso, de la 12-16, aperis "Kongresa Bulteno," kun notoj pri la okazintaĵoj, kaj tradukitaj en Esperanton mondnovajoj.

En plej multaj hoteloj kaj restoracioj oni komprenis Esperanton, kaj presis manĝkartojn esperante! La policanoj ĉe la Akceptejo ankaŭ parolis nian lingvon. Kaj en multaj butikoj ĉeestis esperante parolantaj komizoj. Sur la strato Floryanska oni vidis tutan amason da standardoj Esperantaj, kaj multajn anoncojn "Oni parolas Esperante." La urbestro

faris multon por gajigi nian grandan feston, eĉ eldonante grandan afison kiu petis la publikon ornami siajn domojn en nia honoro! Antaŭ la malfermo de la unua Kunsido la urbestro akceptis la delegitojn per bankedo en la Malnova teatro, kaj aranĝis la Komunan Festmanĝon saman vesperon por ĉiujn gastigi.

Kaj nun por resumi: jam okan fojon ni pruvis per nekontestebla sukceso, ke nia lingvo faris grandajn progresojn! Ni kvazaŭ kaptis, per la signo de nia verda stelo, fortikan urbon, ĉefurbon! Sed tio ĉi estis paca verko, kaj la urbo kaj ĝiaj loĝantoj ĝojas kune kun ni!

Ni rampis sur la remparojn de Wawelo, kaj starigis nian standardon de Esperanto sur ĝiajn murojn! Kaj en la koron de la pola nacio ni starigis la konvinkon, la nedubeblan pruvon ke nia afero prosperas! Kiam ni foriris ni diris "Ĝis la Revido," kaj mi opinias ke neniu adiaŭo estas tiel taŭga kiel tio; ĉar por Esperantisto la mondo ne estas ia granda nekomprenebla vastaĵo! Ĝi estas al li pli aŭ malpli bone konata, ĉar li havas amikojn en ĉiuj landoj; se li iam iras al Kongreso li renkontos homojn jam nome konatajn al li per korespondado. Ĉien li etendas siajn manojn, interlige ĉu kun Persanoj aŭ Finnoj, ĉu kun paŝtistoj de Madagaskaro, ĉu kun la sovaĝuloj de la Fiji aŭ Filipinaj insuloj, aŭ kun la plej kulturaj landpartoj de Eŭropo! Kaj kiam li tiom profitas, ĉu li povas bedaŭri ke li uzis eble du monatojn por lerni Esperanton!

London la 19an de Aŭgusto. Hodiaŭ matene mi frue forveturis. Mi pasis tra la vendeja placo, sur kiu kunvenis de la ĉirkaŭantaj vilaĝoj la kamparaj virinoj kun siaj produktoj, freŝa lakto, flava butero, blankaj ovoĵoj, aŭ eble porkido aŭ kokinoj en korbo. Ili portis kostumojn multkolorajn, kiuj en la frumatena suno vivigas la tutan bildon! Pasante proksime de ili mi aŭdis ke unu el ili, ne konante la vortojn, zumas strofon de "La Espero"! En la stacidomo, la gazetisto kiu vendis al mi ilustritan numeron de Pola ĵurnalo kun Kongresaj bildoj, fajfis "La Tagiĝo." La urbo estas tute esperantigita!

Official Communications

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj voionte presigos komunikadojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj kiuj kies speciala fako de laboro interesos ninjn abonantojn.

The Esperanto Association of North America

Central Office: Washington, D. C.

THE NEW YEAR

With the first of October the new fiscal year of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA begins. All memberships, except those received since the annual meeting in July, expire. It is hoped that the members will renew promptly and so save the expense of sending special notices to them. With the small income of the Association and the many lines of new propaganda under way, in which the money should be used to the best advantage, every notice requesting renewal takes seriously from the time and money which should be devoted to the real work of the Association, viz: the spreading of Esperanto into new fields.

This new year gives every promise of being the best we have yet had. At no time has Esperanto been taken so seriously by so large and influential a class as today. It needs but the concentrated united efforts of the Esperantists of North America to bring some definite concrete action, from the present state of mind of the business and professional man. Under the direction of the new Propaganda Committee of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA the means for getting this united effort is being worked out. Every member of the Association who is willing to give even a little of his time to propaganda, or who will agree to assist in any special ways, is requested to write to Mr. Odiome Gleason, R. 17, Worcester, Mass., who is the Chairman of the general Propaganda Committee.

Those Esperantists who have not joined the organization, who have never put themselves officially upon record as Esperantists, are cordially invited to send their applications for membership in

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA to the General Secretary at THE ESPERANTO OFFICE, Washington, D. C. To unite with those who hold the same high ideals, to assist to such extent as each one can afford for the purpose of promoting the propaganda of these ideals, and giving to others the same pleasure he has had, should certainly be a matter of pleasure to each and every Esperantist! Three grades of annual membership are provided, and it is hoped that each new member, and each renewing member, will elect the highest grade which he can afford, and so assist financially as much as possible. Active membership is but fifty cents a year, payable directly to the General Secretary, or through the District or Local Secretary. Special membership is two dollars and a half. Sustaining membership is ten dollars a year, or, if paid monthly, is one dollar each month. In addition there is Life Membership at one hundred dollars.

ESPERANTISTS UNITE, PAY YOUR DUES PROMPTLY AND WORK HARD TOGETHER!!!

NEW CONSTITUTION

The constitution of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, with all additions and changes to date, has been printed, and a copy will be mailed to anyone sending name, address, and stamp to THE ESPERANTO OFFICE, Washington, D. C.

SPECIAL FINANCE COMMITTEE

In addition to those previously listed, the Special Finance Committee of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA desires to acknowledge with

thanks the following contributions and pledges in support of its work:

Mrs. Belle J. Gochenouer.....	\$ 2.00
G. F. Griffith.....	1.00
D. C. Leahy.....	10.00
J. I. Irwin.....	2.00
Miss Grace Randolph.....	2.00
W. F. F. Selleck.....	5.00
W. G. Stone.....	6.00

TREASURER'S REPORT

SEPTEMBER

RECEIPTS

Cash on hand Sept. 1.....\$ 3.55

Membership Fees	12.00
Sustaining Membership Fees.....	11.00
Examinations25
Contribution (J. N. Wilson).....	5.00

\$31.80

EXPENDITURES

Postage	\$ 1.50
Printing	1.30
Office rent, September.....	7.50
Balance on hand Sept. 30.....	21.50

\$31.80

Anekdoto El La Sekreta Servo

AN bela junia tago en 1901, kiam mi estis ankoraŭ ano de la Usona Sekreta Servo, venis en mian oficejon en Pittsburg, Pa., bonaspekta, juna Italo, kiu parolis angle. Li diris ke li havas fruktan butikon en unu el la fremdaj kvartaloj de la urbo, kaj antaŭ dudek minutoj bela juna knabino estis preterpasanta lian butikon, kiam ŝi haltis kaj acetis frukton por dudek kvin cendoj, doninte al li dudek-dolaran bileton, kaj afable babilinte kun li pri la belega montrajo da fruktoj en liaj butikaj fenestroj, dum nia Itala amiko fosis en ĉiuj liaj poŝoj por trovi deknaŭ dolarojn kaj sepdek kvin cendojn. Fine li donis la monon al la knabino, kiu dolĉe ridetis kaj foriris. La junulo sekvis ŝin per la okuloj ĝis kiam ŝi perdiĝis de la vido inter la popolamaso sur la trotuaro.

Tiam li grade vekiĝis de sia revo kaj ekrigardis sian nove akiritan dudekdolaran bileton, kiun li ankoraŭ tenis en la mano; kaj ĝi ŝajnis al li ne tute bona, kvankam li ne ĝuste sciis kial. Je tiu punkto en la rakonto li liveris al mi la bileton, kiu efektive estis nur kvindolara bileto, tiel lerte ŝanĝita ke ĝi tre similis dudekdolaran bileton. Kiam mi petis ke la Italo priskribu la knabinon li diris ke mi facile rekonos ŝin sen priskribo, ĉar ŝi estas la plej bela estaĵo en Pittsburg, kaj kredeble en la tuta mondo. Tamen, li donis la jenan priskribajon: "Ne plu ol deksejara, mezalta, belforma, kun

malgrandaj manoj kaj piedoj, granda amaso da haroj, tiel nigraj kiel la flugilo de korvo, kiun ŝi portis en du dikegaj kaj tre longaj plektaĵoj ĉe la dorso." Ŝi havis grandajn brunajn okulojn kaj longajn nigrajn okulharojn, malgrandan nazon iometa malkavan, glorajn ruĝajn vangojn kaj lipojn, kaj haŭton kiel la neĝo. Ŝi estis blanke vestita de la kapo ĝis la piedoj kaj portis pajlan maristan ĉapelon. La Itala junulo petegis ke mi ne metu la knabinon en la malliberejon, se mi trovus ŝin, ĉar li estas certa ke ŝia patro aŭ patrino devigis ŝin elpigi la falsan monon. Malgraŭ ĉio ĉi, li volis havigi al ŝi sian bonan monon. En la komenco mi kaj miaj helpantoj estis konfuzitaj, sed baldaŭ mi subite rememoris ke antaŭ kelkej tagoj mi vidis knabinon promenantan sur Kvina Avenuo, kun bone konata monfalsisto kiu estis ellasita el malliberejo antaŭ ĉirkaŭ unu jaro. Kompreneble mi sciis kie estas la domo en kiu loĝis tiu viro, tial mi sendis du el miaj helpantoj por kaŝe rigardi la domon kaj ĉiujn movojn de la monfalsisto.

Baldaŭ ni sciiĝis ke en la sama domo loĝas bela knabino, kiu povus bone konformi al la priskribo donita de la Italo; almenaŭ ŝi ofte eliris kaj eniris. En la dua tago la monfalsisto kaj la knabino eliris kune. La viro eniris apudan drinkejon kaj la knabino daŭrigis sian promanon ĝis la alia flanko de la urbo, kie ŝi eniris malgrandan bakejon kaj acetis bul-

kon da pano, donante al la bakistino dudekdolaran bileton tian, kia estas la bileto kiun ŝi donis al la Italo. Tiam ni arestis ŝin, ankaŭ la viron, kaj kiel eble plej baldaŭ serĉis la ĉambron en kiu li loĝadis. Tie ni trovis en malgranda truo en la muro post granda bildo specialajn plumojn, brosetojn, inkojn k. t. p., uzitajn en la ŝanĝado de la biletoj. Post unu semajno la juĝo okazis, kiam la knabino, kiu efektive estis la edzino de la viro, konfesis la kulpon kaj tute senkulpigis la edzon, dirante ke ŝi kaj sola ŝi ŝanĝis la biletojn kaj elpagis ilin. Ŝi asertis ke la edzo sciis nenion pri la afero; kaj ni havis neniom da pruvo kontraŭ li. Kvankam la tuta juĝistaro bone sciis ke la edzino deziras savi la malindan malkuraĝan edzon je la prezo de sia libereco, restis nenio por fari escepte liberigi la viron kaj enŝlosi la edzinon en la malliberejo dum unu jaro. Ĉiu viro kaj virino en la juĝejo, ankaŭ la juĝisto mem, estus volonte sufokinta tiun viraĉon. Post ses semajnoj ni ree arestis lin en unu el la sudaj ŝtatoj, tial ke li faris kaj elpagis biletojn ŝanĝitajn de unu dolaro ĝis la valoro de kvin dolaroj. Ĉi tiun fojon ni havis sufiĉegon da pruvo, kaj la bona juĝisto, sciante la malfeliĉan sorton de la tro lojala juna edzino, donis al ŝia edzo sep jarojn en la malliberejo; sed li baldaŭ malsaniĝis kaj mortis de tifa febroy.

En decembro, 1911, mi estis en malproksima okcidenta urbo kiam mi ren-

